Universala Esperanto-Asocio

Malferma Tago de CO

Estrara Subteamo: MOVADO

Estrara Komuniko EKO 2016-35 sendita el Roterdamo pri la Malferma Tago, la 27an de novembro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

# La Malferma Tago – la posttagmezo

Plenŝtopitan salonon atendis Chuck Smith kiam li post la tagmeza paŭzo faris prezentaĵon kun la titolo 'Evoluo de E-lernado kaj –komunumo ekde 2000 en la interreto.' Evidente, ankaŭ tiu temo rilatas rekte al la Jaro de la Lernanto, la ĉefteme de la 45a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA. Disdonita folio emfazis la longtempan agadon de la prezentanto en la kampo kaj helpas komprenigi la ĉenon da eventoj, kiuj kulminis en la nunaj projektoj: Duolingo kaj Amikumu. Jen tiu listigo: 2000 Vikipedio (en Esperanto), 2002 Edukado.net kaj Lernu.net, 2007 Komputeko, 2011 Muzaiko, 2012 Vortaro.net kaj *Google Translate* (malfermo al Esperanto), 2015 Evildea (filmetoj), Duolingvo (angla-Esperanto), Telegramo (rapidkomunikilo), 2016 Nova Lernu, *Stack Exchange* (retejo por demandoj kaj respondoj en la angla aŭ Esperanto), Duolingo (hispana-Esperanto, nun en publike alirebla testo-fazo) kaj 2017 Amikumu (trovprogramo kun geografia konscio – trovu per poŝtelefono homojn en via apudeco, kiuj dividas kun vi la kapablon paroli difinitan lingvon). Informoj pri tiu plej nova projekto, subtenata de UEA, troviĝas ĉe amikumu.com aŭ amikumu.com/ks, facebook.com/amikumuapp kaj en *Twitter* ĉe @amikumu. La ĵusa monkolekta kampanjo por la programo arigis en mallonga tempo sumon de 26 mil eŭroj. Planoj estas, ke la servo (nun praktike dulingva) funkciu multlingve kaj poste eĉ por ligi homojn kun samaj interesoj kaj lingvoj.



Pri la aktuala temo 'Afrika-Eŭropa Junulara Kapabligo: por kunhavigi ideojn kaj spertojn de afrikaj kaj eŭropaj esperantistoj' prezentis Pierre Vittet, volontulo de TEJO en la CO. Li rakontis pri sukcesa renkontiĝo en Benino (vidu la kovrilon kaj artikolon de la oktobra numero de la

revuo *Esperanto*. La projekto havas eksteran financadon kaj tial povas enhavi kvar renkontiĝojn, du en Afriko, du en Eŭropo. Grava celo de la projekto estas prepari la vojon por la Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Afriko en 2017.

Pri la ĵus renovigita (kaj renovigata) retejo <esperanto.net> prezentis Judith Meyer. Sekve de konkurso la celo estas doni al la mondo pli trafan multlingvan informejon pri lingva justeco kaj la ebloj de Esperanto. Jam la alteriga paĝo estas pli alloga – kun instigaj bildo, slogano kaj baza teksto; ĝis nun tiu paĝo proponis nur liston de retligoj, sen klarigoj pri la celo de la diversaj paĝoj. Klare la multlingvigo de la paĝaro daŭros, sed donas al varbemuloj abundajn eblojn kontribui praktike al la projekto.

## Seminario pri Informado – aktuala temo por ni

Judith Mayer prezentis denove en la dimanĉa programo, nome seminario pri informado, pretigita ĝuste por tiuj personoj, kiuj preferis resti tra la tuta semajnfino. Tiam ŝi skizis kiel transformi la aliron al la pretigo de retaj komunikoj por altigi la eblojn de 'virusa disvastigo'. Alia referanto estis la anekdotriĉa Mirejo Grosjean. (mezrakonte maldekstre en la bildo)



Seminarianoj havis okazon diskuti engrupe kaj reraporti pere de gluslipetoj, grupigotaj sur tabulo.

Entute okazis inspiraj kaj laborigaj tago kaj semajnfino, pro la zorga elekto de gvidantoj kaj temoj, diversaĝa kaj engaĝita partoprenantaro kaj ebloj por interaktivado.

Raportis: smg, kiu liveris ankaŭ la fotojn.

Vortoj = 470





=========

Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com por aldoni aŭ subtrahi vin de la ricevantaro de EKO

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikojn iru al: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA,_FA...